КНИГОИЗДАТЕЛЬСТВО «ЭСПЕРАНТО».

LIBROELDONEJO «ESPERANTO».

№ 8.

№ 1.

FABLOJ de I. A. KRILOV.

Kun la portreto de l'aŭtoro

kaj

kun la biografio.

ESPERANTIGIS

V. N. Devjatnin.

No. 2061

Цѣна 20 к.

MOSKVO.

В. БУЛГАКОВЪ.

КНИГОИЗДАТЕЛЬСТВО «ЭСПЕРАНТО». LIBROELDONEJO «ESPERANTO».

№ 8.

№ 1.

FABLOJ de I. A. KRILOV.

Kun la portreto de l'aŭtoro

kaj

kun la biografio.

ESPERANTIGIS

V. N. Devjatnin.

MOSKVO.

1910

No 6009

I. A. KRILOV
ruslanda fablisto.

Antaŭparolo.

Fablo estas malgranda ŝerca sagoca rakonteto, en kiu iafoje agadas homoj, sed plej parte iaj bestoj, kreskaĵoj aŭ senanimaj objektoj, el kies interrilatoj oni ricevas ian utilan moralinstruon.

Fabloj devenas el plej malproksima antikveco, kaj ilia patrujo estas Hindujo. En tiu-ĉi lando ĝis nun ankoraŭ ekzistas la legendo, kvazaŭ post morto de homo lia animo transmigras en diversajn bestojn kaj eĉ en kreskaĵojn, kaj oni povas aŭdi multajn rakontojn pri bestoj kaj arboj; sed tie oni aŭskultas tiujn-ĉi rakontojn, kiel sanktajn, kaj oni konfidas ilin, kiel ni konfidas la sanktajn legendojn. La moralinstruan, alegorian karakteron tiuj-ĉi rakontoj alprenis jam multe pli malfrue, en Grekujo, en fabloj de l'unua fablisto Ezopo; sed liaj fabloj estas neagrablaj kaj enuigaj. Prezentis fablon en formo de ŝerca rakonto franca verkisto Lafonteno en XVII centjaro;

el rusaj verkistoj, imitante lin, verkis la fablojn Ĥemnicer kaj Dmitrijev, sed plej bone el ĉiuj ili verkis Krilov; jen kial li estas tiel fama kaj tiel amata de ĉiuj ne sole en Rusujo, sed eĉ en la tuta mondo, kaj ĉiuj ĝin legas kun plezuro.

Bedaŭrinde nia juna esperanta literaturo ĝis nun ankoraŭ ne havas plenan fablaron de Krilov, kvankam malgrandaj rakontoj en formo de fabloj estus plej oportunaj por facila legado ne sole por niaj novaj adeptoj, sed ankaŭ entute por ĉiuj esperantistoj.

Konsciante tiun-ĉi grandan mankon kaj plenumante persistan deziron de multaj niaj geamikoj, ni decidis preni sur nin la taskon esperantigi ĉiujn fablojn de nia fama fablisto kaj prezenti nian laboron al favora atento de niaj gelegantoj.

Por doni eblecon al ĉiu esperantisto havi en sia biblioteko nian tradukon de l'fablaro de Krilov, ni decidis dismeti ĉiujn fablojn en kelkaj libretoj, kiuj laŭ kosto estus akireblaj por ĉiuj: dume ni prezentas al niaj amikoj-samideanoj la unuan numeron el tiu-ĉi kolekto, esperante baldaŭ aperigi la aliajn.

V. Devjatnin.

Ivan Andrejeviĉ Krilov.

„Bibliografia skizo".

(Naskiĝis la 2-an de Februaro 1768, mortis la 9-an de Novembro 1844.)

Mizere kaj malriĉe pasis la infaneco de l'eminenta rusa fablisto. La filo de l'malriĉa armea oficiro, Krilov naskiĝis en Moskvo, sed lia patro estis translokigita Orenburgon, do tie-ĉi, en dezerta malproksima anguleto de Rusujo, la knabo loĝis ĝis okjara aĝo, de neniu edukata. Post humiligo de Pugaĉev, la patro de Krilov komencis civilan servon en urbo Tverj, en gubernia magistrato, sed en 1779-a jaro li mortis, forlasinte la filon kun la patrino tute sen kia ajn havaĵo. La patrino, tre bona virino kun forta karaktero, laboradis el tutaj fortoj, eĉ plenumadis la oficon de legantino ĉe mortintoj, por iamaniere nutri la familion. La filo avide komencis legi diversajn librojn, kiuj restis post morto de l'patro kaj pro bon-

lavoro studis la lingvon francan en la domo de l'prezidanto de ia regna oficejo. Estinte dekkvarjara, li fariĝis skribisto en kaljazina (urbeto Kaljazin) distrikta juĝejo, kaj poste en gubernia magistrato, kie li suferis tre multe da malĝojo.

Sur la bordoj de Volga li ofte aŭskultadis interparoladojn de lavistinoj, vagadis tra bazarojn, ĉirkaŭ balanciloj k. t. p. kaj konatiĝis kun pupola lingvo, popoldiroj, legendoj, kiuj estis al li tiel utilaj poste, dum verkado de l'fabloj. Dekkvinjara knabo, li forveturis kune kun la patrino Peterburgon, por klopodi pri pensio por la servo de l'patro, kaj ree fariĝis skribisto en regna oficejo, kie li ricevadis proksimume 25 kreditajn rublojn da salajro jare!

Travivinte en mizero kun la filo en la ĉefurbo dum kvin jaroj, la patrino de Krilov mortis. Kelkajn fojojn li ŝanĝis la servon, plenigante interrompe siajn malriĉajn sciojn, okupante sin ankaŭ per la literaturo, kvankam sen aparta sukceso. Poste li akiris por administrado presejon, verkis kelkajn piecojn por teatro kaj eĉ eldonadis satirajn ĵurnalojn, servis kiel instruisto en riĉa domo de princo Golicin, unuvorte li vidis kaj elprovis tre multe.

Sian ĝustan karieron de fablisto li komencis nur en 37-jara aĝo en 1805, kuraĝigita de la verkisto Dmitrijev, al kiu li alportis por trarigardo tri fablojn, tradukitajn el lingvo franca, de fablisto Lafanteno; sed la ĝusta famo de Krilov komenciĝas nur de 1809 jaro, kiam aperis en aparta libreto 23 liaj fabloj. Ĉiuj avide legis ilin, volis konatiĝi kun la aŭtoro kaj estis invitantaj lin, kiel bonegan legiston, en eminentajn domojn. La fabloj sekvas unu post la alia, kaj la aŭtoron oni elektas eĉ kiel anon de Ruslanda Akademio, kaj en 1812 j. li ricevis la oficon de bibliotekisto de l'Publika biblioteko, en kiu li servis kaj loĝis seninterrompe ĝis la morto mem dum tridek du jaroj.

La fabloj, verkitaj okaze de l'milito de 1812 jaro («la lupo en hundejo», «la korniko kaj la kokino» kaj al.), faras lin konata al la imperiestro Aleksandro I kaj al Mario Feodorovna; oni donas al li de l'reĝkortego la pension, kaj li fariĝas unu el la kortegaj poetoj, kiel Ĵukovskij, Karamzin kaj al. De tiam li ofte ekaperas en Pavlovsk kaj en la Vintra palaco, kiel legisto kaj gajigisto de Altaj personoj, partoprenante en aranĝado de l'kortegaj maskobaloj

kaj festoj. Trankvile kaj pace, en kontento kaj gloro, pasas de tiu-ĉi tempo lia vivo de senparenca fraŭlo, en rondo de la plej alta societo kaj de kelkaj literaturaj amikoj. En 1838 jaro li, unua el rusaj verkistoj, estis honorigita per solena festado okaze de kvindekjara jubileo de lia verkista agado, kaj, laŭ ordono de l'imperiestro Nikolao Pavloviĉ, estis preparita pro lia honoro eĉ la medalo.

La 9-an de Novembro 1814 Krilov mortis en 76-jara aĝo,—kun grandaj honorigoj estis enterigita en Aleksandro—Neva monahejo, kaj en 1856 jaro al «aveto» (tiel nomis lin liaj adorantoj) estis konstruita en Peterburgo, en la Somera ĝardeno, la belega monumento (laboro de l'fama skulptisto barono Klodt), sur kiu estis skulptitaj diversaj bestoj el la fabloj de l'verkisto.

De 1805 ĝis 1844 jaro, sekve preskaŭ dum 40 jaroj, Krilov verkis proksimume 200 fablojn, t. e. po kvin fabloj ĉiujare. Certe, ĉe tiel granda talento, kian havis Krilov, ĉe libertempo kaj feliĉaj cirkonstancoj, en kiuj li estis verkanta, ni povas nur domaĝi, ke li verkis tiel malmulte; sed malgranda libreto de liaj fabloj starigis lin samrangen kun la plej famaj rusaj verkistoj.

La fabloj de Krilov estas tute vivaj bonegaj rakontoj, ne sole ŝercaj, sed ofte malĝojaj, devigantaj gelegantojn konsideradi, kaj ĉiam interesaj. Sed la plej grava en la fabloj de Krilov estas la popola rusa lingvo kaj prezentado per vivaj figuroj de rusaj homoj, de iliaj moroj, ideoj, virtoj kaj malvirtoj, kiuj estas prezentitaj kun granda amo al sia patrujo, tiel, ke laŭ tiuj-ĉi fabloj ni de infaneco komencas koni kaj ami rusan homon. Per tiel simpla popola lingvo antaŭ Krilov neniu skribis en Rusujo, same kiel neniu prezentis ĝustan rusan vivon popolan kun ĝia simpla viva saĝeco. En la fabloj de Krilov ĉiu plenaĝulo kaj infano antaŭ ĉio trovas la amuzon kaj plezuron, kaj kune kun tio ricevas nerimarkeble ankaŭ la grandegan utilon, konatiĝante kun la patruja vivo kaj ricevante bonan instruadon.

Fabloj de Krilov.

1806 *).

1. La kverko kaj la kano.

La kverk' parolis kun la kan' humila.
«Vi, certe, ĉiam vian sorton plendi povas»,
Li diris: «eĉ pasero estas malfacila
Por vi. Apenaŭ nur ventet' malgranda blovas,
Vi ŝanceliĝas, falas senkuraĝe,
Kaj tiel fleksas vin al tero,
Ke vidi estas vin domaĝe.
Kaj mi, egala al Kaŭkazo, kun fiero,
Ne sole kontraŭ hela sun' mi ombron faras,

*) Notitaj ĉi-tie jaroj montras la tempon de-unna apero de l'fablo en preso (en diversaj tiutempaj ĵurnaloj). Uzata de ni ĥronologia ordo de l'fabloj estas difinita de s-ro Kenevič (vidu «Bibliografiajn kaj historiajn rimarkojn al fabloj de Krilov.)

Sed al ventegoj, fulmatondroj kontraŭ-staras.
Fortika mi kaj rekta staras,
Barita kvazaŭ per nedetruebla paco:
Por mi zefiro estas, kaj por vi—minaco.
Se kreskus vi ĉe mia forta kruro,
Per densa ombr' de miaj branĉoj ĉirkaŭita—
Vi kontraŭ ventoj tiam estus defendita;
Sed vin lokigis iel la naturo
En akvo ŝancelebla apud bord' rivera:
Sendube, estas la natur' al vi severa».
—«Vi tro kompatas min», al li la kano diras:
«Sed mi ne plendas tute, vane vi sopiras.
Mi la ventegojn ne pro mi timiĝas;
Mi fleksas min, sed ne rompiĝas,
Do ili min ne malkuracas;
Kaj vin, mi kredas, ili pli ol min minacas!
Verdire, antaŭ la ventega krueleco
Ne falis via fortikeco,
Kaj pro iliaj batoj vi ne klinis spinon;
Sed—ni atendu finon!»
Apenaŭ ĝin la kano diris,
Kaj flugas jen de norda lando
Pluvego, hajlo, ĝusta ribelega bando.
La kverko staras,—teren kano sin ektiris.
Bruegas vento, fortojn duobligis

Kaj tiun ĝi elradikigis,
Cielon kiu tuŝis per la kap' fiera,
Kaŝante la kalkanon en profundo tera.

---

2. La kapricema fianĉino.

Fianĉon volis trovi la fraŭlino,—
Si estis fianĉino,
Sed jen malbone: estis ŝi fiera.
Ŝi volis, ke fianĉo estu bona, saĝa,
En grandaj rangoj, bela, juna kaj kuraĝa
(Kaj en postuloj siaj estis ŝi sincera):
Ke ĉion havu li. Sed kiu havas ĉion?
Ankoraŭ notu tion,
Ke li ŝin amu, kaj ne kontraŭdiru ion.
Mirinde ŝin dorlotis la filiĉo vera:
Fianĉojn kvazaŭ ŝia sorto
Senĉese sendis mem al ŝia korto.
Sed kapricemaj estis ŝiaj gustoj, plaĉoj:
Fianĉoj tiaj estus bonaj por alia;
Sed opinio ŝia,
Ke ili estas fianĉaĉoj!
Nu, kiun prenos ŝi el tiuj-ĉi junuloj?
Jen unu—ne belul', aliaj—neranguloj:
Kaj tiu estas bela, tamen tre malriĉa;
Senbrova estas, nazo ne sufiĉa;
Ne tio kaj ne tiel;

Al ŝi fianĉoj povas plaĉi jam neniel.
Foriris la fianĉoj, iom ŝi atendis
Kaj novajn svatistinojn sendis;
Sed la fianĉoj estis tute jam aliaj.
«Ho, malsaĝuloj kiaj!»
Fraŭlino diras: «ĉu mi ilin ami povas?
Nu, certe, ili tute vane provas!
Rifuzis ĝustajn mi belulojn,
Kaj nun mi ree kiun vidas?
Ĉu povas mi elekti tiujn-ĉi strangulojn?
Mi edziniĝi dume tute ne rapidas,—
Fraŭlina vivo min ĝis nun neniom ŝarĝis:
Mi tage estas gaja, dormas mi trankvile,
Kaj edziniĝi, certe, estas tre facile».
Kaj ankaŭ tiuj-ĉi fornaĝis.
Kaj jen, post tiu-ĉi rifuzo
Jam la fianĉoj ĉiuj estas en konfuzo.
Jen unu jaro pasis,
Kaj ĉiuj ŝin forlasis;
Ankoraŭ kaj ankoraŭ unu jar' forpasis:
Neniu iras svatistino.
Fraŭlino nia estas jam maturfraŭlino.
La amikinojn ŝi kalkulas
(Enue ŝia temp' sin rulas):
Jen unu, dua edziniĝi jam sukcesis,
Kaj ĉiuj kvazaŭ ŝin forgesis.
Malĝojo kaptis belulinon nian.
Rigardas ŝi,—kaj la spegul' al ŝi raportas,

Ke ĉiutage parton ian
El ŝiaj beloj kruelega temp' forportas.
Foriĝis la vangruĝo, bril' en okuletoj,
Kavetoj ĉarmaj malaperis sur vangetoj;
Gajeco kaj ĝojeco kvazaŭ foren flugis,
La harojn ie jam grizaj' unua plugis:
Mizero ŝin vizitas!
Ŝen ŝi malbone iam estis en kunvenoj;
Ĉirkaŭis ŝin la adorantoj dum festenoj;
Kaj nun jam al kartludo oni ŝin invitas!
Kaj jen pri ŝanĝo de l'konduto ŝi meditas.
La saĝ' ordonas ŝin plej baldaŭ edziniĝi:
Ŝi tute ĉesas fieriĝi.
Kaj kvankam ŝi ameme sin al viroj tiras,
Sed ŝia koro ĉiam tion saman diras.
Por en soleco ne ricevi nulon,
Fraŭlin', dum ŝi ankoraŭ tute ne fortloris,
Unuan, kiun ŝi renkontis, ekfavoris,—
Kaj sian sorton ŝi adoris,
Ke trovis ŝi kriplulon.

---

3. La maljunulo kaj tri junuloj.

Arbeton planti maljunul' decidis.
«Se li konstruus, dirus ni neniun vorton,
Sed plantas li, kaj mem atendas morton!»
Je maljunulo tiel ridis

Triope la junuloj el vilaĝ' najbara.
«Bezonas esti vi Mafuŝajl' multjara,
Se fruktojn volas vi de l'arb' ricevi.
Ĉu efektive povas vi pri tio revi?
Forlasu, maljunulo, la laboron:
Ja, certe, tute vane uzas vi fervoron!
Por vi ne estas unu horo eĉ kredebla.
Por ni intenco tia povas esti ebla:
Ankoraŭ estas junaj, plenaj ni da forto,
Kaj maljunulo devas pensi nur pri morto».
—«Kutimis mi jam al laboro malfacila»
Respondis maljunul' humila:
Sed se per la laboro, kiun nun mi faras,
Utilon ian por aliaj mi preparas,
Mi eĉ konfesas,
En tiu-ĉi labor' mi multe pli progresas.
Bonul' ne sole nur por si laboros.
Plantante arbon, mi pri tio ne forgesos,
Ke se mi mem plezuron havi ne sukcesos,
Genepoj plezuriĝos, kiam ĝi disfloros:
Jam estas frukt' por mi ĉi-tio.
Kaj ĉu por ni ekzistas ia garantio,
Ke longe vivi nin permesos Dio?
Ĉu povas bataladi ia forto,
Beleco, aŭ juneco kun la morto?
Dum mia vivo ne malmulte mi transportis
Da ĉerkoj kun junuloj, kiuj frue mortis!

Ja via morto, eble, estas pli proksima
Kaj vin pli frue kaŝos tero senanima».
La maljunilo kiel diris, tiel statis.
Eknaĝis unu pro komerc' trans mar' senlima;
Feliĉo lin komence per espero flatis;
Sed ŝipon la venteĝ disbatis:
Kaj la naĝanton pereigis mar' kolera.
En fremda land' severa,
La dua, per potenc' malpia
Kaptita, pro amem' pasia,
Per sano pagis kaj per viv' por sia ago.
La tria akvon trinkis en varmega tago
Kaj malsaniĝis; kaj la kuracistoj spertaj
Mortigis lin per kuraciloj lertaj.
Ilian eksciinte sorton,
La maljunul' priploris nun ilian morton.

---

4. La korniko kaj la vulpo.

Al ni ripetas ĉiam saĝo,
Ke flato estas abomena; vane tute:
En koron la flatul' penetros sendispute.
Korniko trovis ie pecon da fromaĝo.
Sur la abion sidiĝinte
Kaj apetite matenmanĝi intencinte,—

Sidante, en la bek' ĝi la fromaĝon tenis.
En tiu sama temp' la ruza vulpo venis.
Odoro de l' fromaĝo ĝin haltigas:
La vulpo vidas ĝin—la vulpon ĝi ravigas.
Al arbo la fripon' sur piedfingroj iras,
La voston svingas, kaj apenaŭ spiras,
Kaj tiel dolĉe, tiel ĉarme diras:
«Kolombo mia, kiel bela!
Koleto kia, okuletoj!
Kaj kia eksteraĵ' ĉiela!
Beketo kia kaj plumetoj
Kaj certe devas esti via voĉ' anĝela!
Ekkantu! Se vi bone kantas, kara mia,
Kun eksteraĵo ĉarma kaj belega tia,
Vi estus birdo—reĝo nia!»
Pro laŭdoj la kornikon kaptis kvazaŭ morto,
De ĝojo en la brust' spirado haltis,
Kaj pro afabla de la vulpo laŭda vorto
La malsaĝulo garkis per la tuta forto:
Elfalis la fromaĝ'—kun ĝi la vulp' forsaltis.

---

5. La rano kaj la bovo.

En la paŝtej' promenis bovo-grandegulo.
La rano mem kun ĝi ekvolis egaliĝi.
La rano estis enviulo,—
Kaj ĝi plenblovi sin komencis kaj pufiĝi.
«Nu, kvakulaĉo, ĉu mi estas granda tia?»
Demandas ĝi amikon.—«Ne, ne granda tute!»
—«Rigardu, kiel nun mi min plenblovos krute.
Nu, vidu, kia?
Cu estas mi pli granda?—«Preskaŭ same tia».
—«Nu, kiel nun?»—«Nenio». Gi pri bovo revis,
Pufiĝis kaj pufiĝis, kaj post troa provo
Ne egaliĝis ĝi kun bovo,
Sed de streĉado superforta krevis.

Similaj estas multaj al la rano:
Cu estas miro, kiam iu vilaĝano
Deziras esti ĉefurbano
Kaj ia simpla, sensignifa bub'—regnano?

---

6. La kesteto.

Ne povas ofte ni kompreni
Objekton, kiun nur diveni
Bezonas ni,—sen konsidero
Alpaŝi al afero
Alportis iu la kesteton de meblisto.
Mirinda estis la kesteto pura, hela,—
Kaj ĉiuj do admiris je kesteto bela.
Eniras ĉambron ia mekanikartisto.
Kaj jen li diras: «Ha, ĝi havas ja sekreton;
Jes, sen seruro, vidu;
Sed povas mi malfermi tiun-ĉi kesteton,—
Mi petas vin, je mi ne ridu!
Min tute ne timigas ia artifiko:
Sufiĉe estas lerta mi en mekaniko».
Kaj jen per sperta majstra gesto
Li manipulas kun la kesto,—
Turmentas sian saĝan kapon:
Li premas ian najlon, krampon, ian klapon.
Lin ĉiuflanke ĉiuj vidas,
Balancas iu kapon,
Aliaj flustras, kaj aliaj moke ridas.
En la oreloj nur sonoras:
«Ne, ne, ne tiel, ne!» La majstro pli laboras.
Li ŝvitis, ŝvitis; fine li laciĝis
Kaj de la kest' foriĝis,
Ne kompreninte la sekreton de l'kesteto,
Sed ĝi eĉ estis sen sekreto.

7. Leona divido.

Leono, hundo, vulp' kaj lupo
  Hajbare enlokiĝis,
  Kaj jen okupo
  Ĉe tiu trupo
Komune kiel difiniĝis:
Ni unu la alian fidu,
Kaptitajn kune bestojn juste ni dividu.
Ne scias mi, per kio kaj por kia kulpo,
  Sufokis cervon vulpo,
  Kaj la kolegojn ĝi vizitas
  Kaj ilin al divid' invitas:
  Akiro tia estas bono!
Alvenis baldaŭ ĉiuj kune; la leono
  Rigardas ĉiujn', la piedojn ĝi eltiras,
  Akiron disdividas.
«Ni estas ja kvarope nun" li diras,—
Kaj je kvar partoj ĝi la cervon tuj disŝiras.
«Kaj nun ni ekdividu! Vi, kolegoj, vidas:
  Ĉi-tiu parto estas mia
  Laŭ la kondiĉo nia;
Ci-tiu dua parto, kiun nun mi prenas,
Kaj tiu-ĉi al mi sendube apartenas;
Gaj tiun-ĉi se iu preni ekdeziros,
  Ĉi hejmen ne foriros».

---

8. La simioj.

Se ni imitas saĝe, tiam ni de tio
  Nin povas senti tute bone;
  Sed imitadi senrezone,—
  De tio nin defendu Dio!

Ekzemplon donos mi el lando malproksima.
  Simiojn kiu vidis, scias tion,
  Ke ĉiam ili imitadas ĉion.
En sud-Afriko, en arbar' senlima
  Anaro da simioj sidis
Sur densa arbo, sur la branĉoj kaj branĉetoj:
  Kaŝitaj, ili la ĉasiston vidis,
Baraktis kiu sur herbejo en la retoj.
Kaj jen interrigardas tuta ar' simia,
  Flustrante unu al alia:
  «Rigardu, vidu lin, amikoj,
Senfinaj estas ĉiuj liaj artifikoj:
    Jen bravulo!
    Kvazaŭ bulo
    Li volviĝas,
    Poste rektiĝas
  Li estas ĝusta petolulo.
  Ĉu ni ne estas la ŝerculoj?
Sed tiel ni ne povas salti, gliti!

Amikoj—petoluloj!
De li ni devas tion-ĉi imiti.
Sed jen li sin amuzis, ŝajne, jam sufiĉe;
Kredeble li foriros baldaŭ,—tiam... Vidu,
Li efektive jam foriris kaj, feliĉe,
Por ni forlasis siajn retojn. Nu, rapidu,
Amikoj, amuziĝi!»
Alvenas ili. Por la gastoj atenditaj
Sur tero estas multaj retoj dissternitaj.
Komeneis ili salti kaj ruliĝi,
Volviĝi, kuri, malvolviĝi;
Kriegas ili, ĝojas senmezure!
Sed jen terure:
Ne liberigas ilin nun la retoj!
La mastro ilin bone gardis
Kaj ĝustatempe li alvenis kun saketoj.
Timeme ili ekrigardis,
Sed vane el la retoj kuri penis,—
Kaj oni ilin ĉiujn prenis.—

---

9. La muzikantoj.

Najbar' invitis la amikon
Tagmanĝi, sed la penson havis
Alian: lin kantistoj ravis,
Kaj volis li, ke aŭdu la najbar' muzikon.
Sovaĝe, dise ekkriegis la bravuloj:

La gaston kaptis ia skrapo,
Mallum' aperis en okuloj
Kaj ekdoloris eĉ la kapo.
«Forpelu ilin, kara» diris li sincere:
Pardonu min! Pro via ĥoro
Min kaptis la doloro!»
Sed lin la mastr' respondis: «estas tute vere,
Kriegas ili dise iom,
Pri brando tamen pensas eĉ neniom,
Kaj ĉiuj montras sin modere».

Laŭ mi: en brand' pli bone ne sin ĝenu,
Sed pri afer' komprenu.

---

10. Parnaso.

Post kiam oni diojn el Grekuj' forigis
Kaj al landanoj disdonadis dibienojn,
Al iu hom' Parnason oni allimigis;
La mastr' sur ĝi komencis paŝti la azenojn.
Azenoj, ŝajne, iam sonĝis,
Ke sur Parnas' la muzoj loĝis
«Ne vane sekve—ili diris—
Parnason oni nin altiris:
Al mondo tedis kantoj diaj.

Kaj revas ĝi pri kantoj niaj.»
«Aŭskultu, la unua krias, min atente!
Ekkantos mi,—kaj kantu vi konsente!
Nenio vin timigu!
Azenojn ni glorigu!
Pli laŭte eĉ, ol la muzaro,
La hôron faros kaj ekkantos azenaro!
Sed por ne senordiĝu la azenamaso,
Al nia soĉiet' mi faras la proponon:
Se iu en la voĉ' ne havas bonan tonon,
Ni tiun pelu el Parnaso».
Alpreni ĉiuj tuj ordonis,
Azeno kion nun proponis:
Kaj tiel bone ekkriegis nova ĥoro,
Ke ŝajnis en ĉi—tiu horo,
Ekkrakis kvazaŭ multaj radoj ne ŝmiritaj.
Per kio do finiĝis tiu kant' sovaĝa?
La anoj de brutaro saĝa
En stalon estis enpelitaj.

Gi estos por la kelkaj abomena,
Sed memorigos mi al vi sentencon:
Se estas ies kap' malplena,
Al tiu kap' neniu loko donos sencon.

---

11. La ermito kaj la urso.

Por ni komplezo estas kara ĉe mizero,
Sed ja ne ĉiu spertas en ĉi—tio:
De malsaĝul' nin savu Dio!
De malsaĝulo povas veni nur danĝero.

Ermito ia senparenca loĝis sole
En la dezert'. Pri viv' dezerta
Vi povas bone skribi, tamen estu certa,
Ke en solec' ne ĉiu loĝos propravole:
Bezonas ĝojon kaj malĝojon ni dividi.
Al mi respondi povas vi: «sed rivereton,
Herbejon silkan, kaj arbaron, kaj monteton
Vi ĉiam tie povas vidi!»
Sed tie aŭdos vi nenium eĉ vorteton.
Kaj ankaŭ same la ermito
Enuis ĉiam esti izolito.
Li tra arbaroj iras al najbaroj,
Kun iu konatiĝi provi.
Sed ĉu vi povas trovi,
Krom ursoj, iun en arbaroj?
Kaj etiktive, baldaŭ al ermit' renkonte,
Ne rapidante, granda urso iras.
Salutas la ermito ĝin volonte,
Al li piedon la ursego tiras,
Jen ili konatiĝas, poste vort' post vorto

Eĉ amikiĝas,—
Kaj jen neniam jam disiĝas:
Por ĉiam ilin ligis blinda sorto.
Pri kio ili diris, kiel sin konsolis,
Rakontis unu al alia kion,—
Pri ticos ias mi nenion,
Ekscii kvankam tion volis:
La urso estis silentema
Kaj la ermit' ne parolema,—
Kaj tial ili multe ne parolis.
Sed, kvankam la amik' ne estis elokventa,
La dezertulo estis tre kontenta.
Pri la amiko—urs' neniam li forgesas,
Kaj ĉie laŭdi ĝin neniam ĉesas.
Amika nia paro vera
Promenis foje en varmega hor' somera
En valo, en arbar' mistera;
Sed ĉar la urso estas ĉiam pli fortika,—
Pli baldaŭ, ol la urso dika,
L'ermito eklaciĝis
Kaj de l'amiko posteiĝis.
Al la ermit' proponas la amiko vera:
«Kuŝiĝu kaj ripozu, frato,
Kaj poste dormu eĉ, amato,
Kaj mi gardados vin dum mia temp' libera».
Konsentis la ermit': kuŝiĝis, ekoscedis,

Kaj dorm' lin ekposedis.
La urso gardas. Jen subite ia muŝo
Sidiĝis ĉe l'amika buŝo;
La urs' atente sidas
La muŝon vidas,
Forpelas ĝin, sed ĝi sidiĝas sur la nazo;
Ĝi svingas, sed la muŝo
Tedema sidas ree sur la buŝo.
La urson kolerigas la okazo,
Kaj grandan ŝtonon trovi ĝi rapidas,
Fleksiĝas singardeme kaj apenaŭ spiras;
«Atendu do, bastardo», ĝi kolere diras.
Li vidas, ke la muŝo sur la frunto sidas,—
Kaj jen la urso ĝin per sia forto bruta
Ekbatis tiel, ke krani' amika tuta
Ekkrevis, kaj l'amik' por ĉiam restis muta.

---

12. La orakolo.

En ia idolejo estis ligna dio;
Kaj jen profeti li komencis tre kuraĝe
Kaj ĉiujn eĉ konsili saĝe.
Kovrita estas li por tio
Per ora ŝtofo, per arĝento

De l' kapo ĝis la fundamento,
Per preĝoj, per oferoj tute ĉirkaŭita,
Per timiano sufokita.
La orakolon ciuj fidas;
Subite—mirindaĵo kia!
Absurdas orakolo nia:
Ĉi-tion vizitantoj ĉiuj vidas,
Ĉar ĉiam, se al li pro io iu venas,
La orakol' nenion jam divenas;
Do ĉiuj vizitantoj miris,
Pro kio la talent' de li foriris!
Sed ĉio simpla estis:
En la malplena orakolo ĉiam nestis
Profeto-idolulo,
Kiam
Profeto saĝa estis, la idol' neniam
Malsaĝe profetadis tiam;
Sed nun li estas malsaĝulo.

Mi aŭdis—vere—kvazaŭ iam
Juĝisto tia estis
Tre saĝa kaj tre sperta, nur ĝis kiam
Ce li sekretario saĝa restis.

---

13. La lupo kaj la ŝafido.

Fortul' neniam premi malfortulon hontas;
Al ni ekzemplojn tiajn donas historio,
Sed ni forgesis jam pri tio;
Kaj jen pri kio fabl' al ni rakontas.
Ŝafido dum varmego trinkis el rivero;
Subite venis la mizero:
Vagadis tie-ĉi malsata lup' proksime.
Tuj mem rapidas ĝi al la ŝafid'—ofero;
Gi volas tamen agi leĝe, sed ne krime,
Kaj krias: «vi, bastard', forgesis pri estimo,
Ĉar vi trinkaĵon puran tian
Mian
Ekmiksis kun la ŝlimo!
Por tia kondutaĉo
Vi restos tuj sen la kapaĉo!
—«Se via lupa moŝt' permesos,
Mi diros: evidente mi ja vin konvinkas,
Ke mi de vi cent paŝojn malproksime trinkas;
Do vi koleron vian nun forgesos:
Trinkaĵon vian malpurigi mi ne povas»
—«Do sekve mi mensogas!
Fripono! Kiel ne forglutos vin la tero!
Ĉi tie ankaŭ en pasinta vi somero
Insulti min al vi permesis:
Mi tion-ĉi, amiko, ne forgesis!»

—«De mia tagnaskiĝ' ne pasis unu jaro»
Respondas la ŝafid'.—«Nu, sekve frato via».
—«Ne havas mi la fratojn».—«Nu bofra to ia,
Baptan', aŭ iu ajn el via parencaro.
Vi mem, kaj ĉiuj hundoj, kaj paŝtistoj viaj—
Vi per malamo spiras
Kaj ĉiuj ĉiam pereigi min deziras,—
Kaj mi nun punos vin por la suferoj miaj».
—«Cu estas kulpa mi?»—«Nu, mi vin ne aŭskultas.
Ne volas mi prijuĝi vian parencaron!
Vi estas kulpa, ĉar malŝato min tumultas».
Kaj ĝi forportis la ŝafidon en arbaron.

---

14. La libelo kaj la formiko.

La libelo malserioza
Kantis dum la temp' somera,
Kaj alvenis vintr' severa
Kun la frosto furioza.
Malpleniĝis kampo riĉa
Kaj forpasis temp' feliĉa,
Kiam sub folio ĉia
Estis manĝ' kaj hejmo ĝia.

Dum la vintro malamata
Jam kamparo ne konsolas;
La libel' jam ne petolas:
Kiu-do petoli volas
Kun stomako tro malsata!
Kun aspekto malfortika
Rampas ĝi al nest' formika:
«Helpu min en la mizero
Gis venonta nur somero!
Nun min kaptis malfortiko,
Prenu min al vi, amiko!»
—«Strange,—diras mi sincere:
Ĉu laboris vi somere?»
Gin demandas la formiko.
—«Mi labori eĉ ne provis!
Dum someraj ĉiuj horoj
Ni saltadis inter floroj,—
Mi nur kanti, danci povis.»
—«Sekve vi...»—«En kampoj niaj
Kantis tutan mi someron.»
—«Faris bonan vi aferon:
Iru-do al kampoj viaj!»

---

15. La aglo kaj la kokinoj.

Ekspiri dezirante per la tutaj pulmoj,
La aglo al nubegoj venis,
Kaj tie ĝi promenis,
Naskiĝas kie fulmoj.
Kaj mallevinte sin el la ĉiela valo,
Sidiĝis por ripoz' la reĝo—bird' sur stalo.
Por ĝi ĉi—tiu lok' ne estis bonkvalita,
Sed kapricema estas reĝa koro:
Ci tio, eble, estus por la stal' honoro,
Aŭ lok' nenia estis en ĉi—tiu horo,
Nek kverko, nek ŝtoneĝ' granita;
Ne scias mi, al ĝi aperis penso kia,
Sed reĝo—birdo nia
Transflugis ial baldaŭ al la stal' alia.
Vidante tion—ĉi, la kovulino
Al sia najbarino diras:
«Pro kio ĉiuj tiel miras
Je agla flugo, mia belulino?
Mi ankaŭ,—vere mi parolas,—
La ĝuste saman faras, kiam mi nur volas.
Do ni ne estu ja malsaĝulinoj,
Por pensi, ke la agloj altranguloj
Pli gloraj estas. Ni per propraj la okuloj
Jus vidis: tiuj-ĉi lertuloj
Malalte same flugas, kiel la kokinoj».
La aglo tedigita diras sendiskute:

—«Vi estas prava, sed ne tute:
Ĝis tero agloj iafoje malleviĝas:
Sed vi, kokinoj, ĝis la nuboj ne leviĝas!»

Se iam antaŭ la okuloj
Talentojn iajn vidas vi, neniam penu
Difektojn trovi, sed pli bone vi komprenu
Diversajn bonajn ecojn de la talentuloj.

---

16. La muŝo kaj la vojaĝantoj.

Somere, dum varmega tago, en Julio,
Sur vojo sabla kaj dekliva,
Kun pakoj kaj kun granda familio,
Kaleŝo tre masiva
Treniĝis.
La kvaro da ĉevaloj tute forlaciĝis.
De loko la veturigisto saltis.
Kaj kiam la ĉevaloj haltis,
De ambaŭ flankoj ilin la veturigisto
Kun la lakeo batas. La sinjor' eliris,
La sinjorin' kun servantino, instruisto.
Sed la ĉevaloj la kaleŝon ne ektiris,
Car estis ĝi tro multe ŝarĝigita
Kaj per la monta sabla vojo malhelpita.
Alflugis muŝo. Je l'mizer' ĝi eksopiris
Kaj helpi volas: laŭte zumi ĝi komencas;

Jen ĉirkaŭflugas veturilon,
Jen flankĉevalon helpi ĝi intencas,
Jen sidas sur la kondukilon,
Jen la veturigiston mordi ĝi atencas;
Aŭ la ĉevalojn ĝi forlasas,
La vojaĝantojn tedas, inter ili pasas;
Klopodas ĝi kaj pro laĉiĝ' apenaŭ spiras,
Zumante laŭte ĉirkaŭ ĉiu,
Kaj plendas, ke neniu,
Ĝin helpi nun deziras.
La servantaro malantaŭe piediras;
La instruist' al sinjorin' sekretojn diras;
Kaj la sinjoro, forgesinte, kion devis,
Kun servantino en arbar' pri fungoj revis;
La muŝo ĉirkaŭ ĉiuj per zumad' sonoras,
Ke sola ĝi laboras.
Sed dume iom ripozinta ĉevalkvaro
Prosperis jam elrampi el sablaro.
Nu, nun jam glor' al Dio!» diras muŝ' kun ĝojo:
«Sidiĝu, kaj feliĉa estu via vojo;
Kaj mi post tiom da laboro
Ripozos dum duon' da horo».

Ekzistas homoj, kiuj kun fervoro
Al plej diversaj faroj sin sensence metas,
Klopodas, kiam oni ilin eĉ ne petas.

---

17. La elefanto—vojevodo.

Se iu estas forta, eminenta,
Sed malprudenta,
Ne plibonigas lin la koro sentimenta.

Fariĝis iam en arbaro elefanto
De ĉiuj bestoj vojevodo—prezidanto.
Ne tiel, kiel ĉe gentaro ĝia,
Ĉe vojevodo nia
La korpo estis dika,
La saĝo malfortika,—
Sed ĉiujn bestojn ĝi favore gvidas.
Jen bona vojevodo vidas:
Al ĝi de ĉiuj ŝafoj la petskribo venas:
«De ni la lastan felon lupa ar' forprenas.»
—«Friponoj! «ĝi ekkris:» kia rab' malpia!
Mi punos vin por krimo tia!»
La lupoj diras: «nin pardonu, patro kara!
Vi mem al ni por paltoj felaj
Permesis iom preni de la gent' ŝafara!
Sed ĉiuj ŝafoj estas ja ribelaj:
De ili preni ni po unu fel' proponas,
Kaj ili tion eĉ ne donas».
—«Nu, bone» diras elefanto: «sed komprenu,
Ke mi ne povas vidi la malveron:
Po unu fel' de ili prenu,
Sed pli ne tuŝu unu eĉ hareron».

---

18. La vulpo kaj la vinbero.

La vulp' enrampis en ĝardenon ĉe okazo;
En ĝi vinberaj tufoj ardis.
La vulpo ilin kun plezuro ekrigardis;
La tufoj sukaj similiĝis al topazo;
Kaj ĝi tuj mem eksentis la mizeron:
Tro alte! Ilin ĝi atingi provas,
Gi vidas la vinberon,
Sed preni ĝin ne povas,—
Do vane devis ĝi suferi.
La vulp' foriras kaj eldiras: «estas vero,
Bongusta estas bero,
Sed ne matura la vinbero:
Agaco povas ja aperi.»

---

19. La maljunulo kaj la morto.

Kun branĉligaĵo, en kruela vintr' malluma,
La maljunulo, per mizeroj sekigita,
Apenaŭ movis sin al la dometo fuma,
Per ŝarĝa branĉligaĵo tute alpremita.
Li longe la pakaĵon portis
Kaj sin perfortis,
Sed poste ĝin forĵetis, eksopiris,
Sur ĝi sidiĝis kaj per laca voĉo diris:

«Malriĉa estas mi, ho, Dio!
Bezonas ĉion mi; min premas familio,
Servuto kun labor' senĉesa, regna pago;
Sed ĉu ĝojigis min por tio
Almenaŭ unu bona, luma tago?»
Kaj jen alvokas li la morton en imago;
Sed ĝi ne estas ja en alilando ia,
Sed post la dorso nia:
Ĝi tuj aperis
Kaj diras: «Ĉu vi vokis min, ĉar vi suferis?»
Vidante ĝian teruregan eksteraĵon,
Respondis ĝin la maljunul' en malespero:
«Mi vokis vin, ne pro kolero,
Ke vi min helpu levi mian branĉligaĵon».

Ni bone vidas
El fabl' ĉi-tiu,
Ke se eĉ vokas morton iu
Li morti tamen ne rapidas.

---

20. La elefanto kaj la mopso.

Sur stratoj oni kondukadis
Grandegan elefanton.
Ne ofte oni vidas tiun-ĉi giganton;
Do multaj scivoluloj post gigant' vagadis.

Subite antaŭ ili kuras mops' renkonte.
Vidante elefanton, ĝi komencis kvaki,
Kaj boji, kaj de ĉiuj flankoj ĝin ataki,
  Batali kvazaŭ volas ĝi senhonte.
  «Ne boju vane, kara mia»
Al ĝi konsilon donas la hundet' alia:
«Rigardu, vi jam raŭkas kaj apenaŭ spiras,
  Kaj ĝi nur iras,
Kaj bojon vian eĉ rimarki ne deziras».
  «He, vi!» al ĝi la mopso diras:
  Ĝi estas ja bonege sendispute,
  Ke sen batalo tute
Mi povas tamen ŝajni tre kuraĝa.
  Nun diru ia hund' malsaĝa:
  «Jen estas kia mopso nia,—
  Ĝi bojas je giganto tia!»

1809.

21. La mastro kaj la musoj.

Se oni vin priŝtelas iam,
  Kaj vi ne scias, kiu,
  Kulpigu vi neniam
La tutan servantaron, ĉar per ago tiu
  Ŝteliston vi ne trovos
  Kaj lin ne honestigos,
La servantaro nur de vi forkuri povos
Kaj vi havaĵon vian tutan pereigos.

  La komercist' grenejon faris,
  En kiu la provizojn li preparis.
Sed ĉar forigi volis musan li malicon,
El multaj katoj li aranĝis la policon.
  Trankvila estas sprita komercisto:
  En la grenejo vagas la patrolo;
Kaj bone estus, sed okazis la petolo:
  En la patrol' aperis la ŝtelisto.
Ni ĉiuj scias, ke okazas inter katoj
  Friponoj, kiel inter niaj fratoj;
  Anstataŭ la ŝteliston kapti

Kaj ĝin per vergo bone, senkompate bapti,
La mastro ĉiujn katojn vergi ekdecidis.
La katoj tiun maljustecon bone vidis,
Kaj ĉiuj ili forrapidis
El la grenejo lia.
Sen katoj restis mastro nia.
La musoj tion—ĉi atendiskaj deziris:
Apenaŭ la patrol' foriris,
Grenejon ili venis,
Kaj manĝi ĉion penis.

Магазинъ
Б Д

Изданія книгоиздательства „ЭСПЕРАНТО".

Л. Н. Титовъ. «Эсперанто въ десять уроковъ». Цѣна 30 коп.
Полный систематическій учебникъ-самоучитель языка «Эсперанто.

«Ключъ» къ учебнику **«Эсперанто въ десять уроковъ.** Цѣна 20 коп.

Л. Т. Титовъ. «Эсперантская хрестоматія». Цѣна 75 коп.
Содержаніе: I) Анекдоты, изреченія, пословицы. II) Разсказы, описанія, сказки, басни. III) Поэзія. IV) Образцы изящной литературы. V) Разговоры, письма и т. п. Приложенія.

Л. Т. Титовъ. Эсперантско-русскій словарь. Цѣна 75 коп.

Л. Т. Титовъ. Русско-эсперантскіе разговоры (печатается).

Л. Т. Титовъ. Русско-эсперантскій словарь (печатается).

I. Turgenev, «Versaĵoj en Prozo». Ц. 40 к.

Вил. Оствальдъ, проф. Лейпцигскаго унив., **Международный языкъ** (2 доклада). Съ добавленіемъ **Л. Т. Титова:** «Современное состояніе языка **«Эсперанто»** на земномъ шарѣ». Цѣна 10 коп.

Р. Х. Брандтъ, проф. Моск. унив., **О международныхъ языкахъ вообще и въ частности объ «Эсперанто».** Цѣна 5 к.

СКЛАДЪ и КОНТОРА:
КНИЖНЫЙ МАГАЗИНЪ „ЗНАНІЕ".
Москва, Петровскія линіи. Телеф. № 249-45.

Т-во Скоропеч. А. А. Левенсонъ Москва.